

**DIA REGNO**  
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 2 (911) • 2015 •

Ja tiom amis Dio la  
mondon, ke sian unikan  
filon Li donis, tiel ke ĉiu  
kiu fidas je li, ne pereu  
sed havu eternan vivon.  
Joh 3,16



Ekumenaj  
Bibliaj tagoj  
en Vroclavo

Atentaj aŭskultantoj  
dum prelego



Kreskantaj  
eklezioj en  
Tanzanio

Dancado ekster preĝejo

## KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el  
diversaj landoj kaj per Esperanto  
diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

**Sekretario:** Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,  
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio  
☎ +420311241406;  
✉ polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto:** Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,  
HU 1072 Budapest, Hungario  
☎ +36 302 000 306;  
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume  
€20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono:  
pagante rekte al KELI €16,- • pagante al  
Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj  
per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto  
(informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA  
por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de  
'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':  
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;  
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;  
☎ +46 70 2004574; ✉ dr\_board@yahoo.se

**Kontrollegis:** Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ  
egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la  
kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la  
aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke  
oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ  
traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio  
✉ info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## ENHAVO

Ni lernas pli bonajn	27
La repaciĝa preĝo de Coventry	30
Kreskantaj eklezioj en Tanzanio	31
Liberigo per la Nomo de Jesuo	33
Hendrik de Hoog sepdekjara	37
Vesperaj pensoj	40
Vesproj	41
Februara letero	42
Ekumenaj Bibliaj tagoj	44
Informetoj	46
Daŭriga listo de kongresaj aliĝintoj	47
Jesu', ni adoru	48

## Redaktoraj vortoj

Ĉi-printempe mi kaj mia edzino havis  
la eblecon viziti Romon. Estis granda  
travivaĵo promeni inter historiaj  
domoj kaj restaĵoj kaj iom refreŝigi la  
memoron pri nia kristana historio. Mi  
samtempe legis la libron de Gerrit  
Berveling – KONCIZA HISTORIO DE  
KRISTANISMO – kies paĝoj viviĝis en  
tiu historia etoso. Vere estas interese  
lerni pri niaj radikoj, kaj kiel evoluis  
la kristanismo. Multaj fervoraj krist-  
anoj dise transportis la bonan mesaĝon  
dum la unuaj jarcentoj.

Sed tamen estas tute alia vivo, pri  
kiu ni lernas kaj legas en la artikolo pri  
la nuntempa, vivanta kaj kreskanta  
eklezio en Tanzanio. En multaj eŭropaj  
landoj la eklezioj stagnas – kial, ĉu ni  
perdis ion survoje?

Kiel kutime mi esperas ke vi trovas  
la multvarian enhavon, kun la diversaj  
artikoloj, interesa kaj pensiga. Bonan  
legadon!

# Ni lernas pli bonajn

József FARKAS, hungara protestanta pastoro (1914-1999)

Tradukis Éva FARKAS-TATÁR

**C**i tiuj vortoj aludas al la Dua Helveta Konfesio. Mi estas konvinkita ke la plej valora parto de la Konfesio estas tiuj kelkaj frazoj kiuj legeblas en la fino de la Enkonduko: "... ni estas pretaj ankaŭ pli detale eksplicite/disvolvi la ĉi tie prezentitajn eĉ al tiuj, kiuj el la Parolo de Sinjoro instruas al ni pli bonajn, kun dankesprimoj ni cedas en la Sinjoro, al kiu estu laŭdo kaj gloro."

Ni do diras nian kredkonfesojn, sed ni ne konsideras nin neeraripovaj kaj ankaŭ nian Konfesojn ni ne konsideras definitiva, fermita. Ni ne scias "pli bonajn" instrui ol la ĉi tie diritaj sed ni ne ekskluzivas ke eblas ankaŭ pli bonaj instruoj ol la ĉi tieaj. – Plezurigas min ĉi tiu humila malfermiteco kaj en ĉi tiu signoj mi konfesas ankaŭ min mem reformita kredanto.

Tio estas nia tragedio ke kvankam ni eĉ skribe fiksis ĉi tiun malfermitecon kaj teorie ankaŭ nun ni tion konfesas,

sed eĉ spuro ne troviĝas ke ni volus vivi en ĉi tiu vasteco. Kio naskiĝis en la mezo de la 16-a jarcento pri tio eĉ ĝiaj kreintoj tiel pensis ke ili konfesis sian kredon "dumvoje". Ni nun estas ĉi tie, sed ĝi ne estas la finstacio. Sed en la reformita ortodoksio finstacio fariĝis tiu dumvoje naskiĝinta kredkonfeso.

Jam estas ĉi tie la tempo ke ni vere estu "reformitaj" kristanoj. Ni cedu al tiuj "pli bonaj" instruoj, kiuj depost Kalvino kaj la aliaj klariĝis el la rezultoj de la biblioexplorado. Intertempe kun plena estimo kaj dankemo ni honoras al la reformatoroj ĉar en ilia tempo kun grandega sindono, malfermiteco kaj fideleco ili "studadis la Skribojn". En kio ni estas nun pli antaŭe ol ili estis?

En multaj. Laŭ la esplorado de la antikva historio respektive el la elfosadoj troviĝis multaj novaj datoj kaj ankaŭ nia pensmaniero, nia veronserĉa metodo signife ŝanĝiĝis. Kiam nun mi prezentas

**L**a Dua Helveta Konfesio estis skribita de Bullinger en 1562 kaj revizita en 1564 kiel privata entrepreno. Sed ĝi estis poste tradukita en la germanan lingvon kaj publikigita. Ĝi estis favore akceptita en la svisaj ekleziaj komunumoj, kiuj opiniis la Unuan Konfesojn (de 1536) tro mallonga kaj tro luterana. Ne nur en Svislando la Reformerta Eklezio akceptis ĝin, sed ankaŭ en Skotlando (1566), Hungario (1567), Francio (1571) kaj Pollando (1578).

[Bazita sur la angla Vikipedio]

tri tiajn temogrupojn en kiuj ni devas pli antaŭen paŝi ol kie la reformatoroj estis, mi denove emfazas ke mi ne juĝas pri la reformatoroj. Mi ne asertas ke ankaŭ ili jam devintus scii tion, kio dumvoje – dum jarcentoj – klariĝis. Sed ni eraras se la estimo al nia historio tiom paralizigas nin, ke ni ne povas antaŭen moviĝi, enpaŝi en la Nuntempon.

## 1 Senperforteco

Pli multe estas ke ”*amu viajn mal-amikojn*” (Mateo 5). Laŭ hodiaŭa mezurilo neakcepteble perforta estis la popolo de la reformacio. Estas vere, ke laŭ la indikoj de la historio la inkvizicio havis pli ol tridek mil viktimojn sed tiuj kune ne povas forgesigi la honton de tiu ŝtiparo sur kiu Mikaelo Servet estis sendita en morton en la urbo Ĝenevo. La sango de la ribelantaj kamparanoj de Tomaso Müntzer kaj eĉ pli la multmiloj da martiroj de la anabaptistoj (baptistoj) pruvas, ke la principan instruon de la Monta Prediko oni ne komprenis en la 16-a jarcento kaj eĉ la reformatoroj ne komprenis ĝin. Ne solvas la problemon ke hodiaŭ jam la ŝtatpotenco ne permesas la ”jurisdikcion” de la ŝtiparoj. Vaste eblas perforto ankaŭ hodiaŭ ene de la eklezioj. Troviĝas ankaŭ hodiaŭ potencemaj ĉefpastoroj kaj ... vikarioj,

sektoestroj. Hodiaŭ jam estas aparta scienca branĉo ellabori la senperfortan solvon de problemoj. En ĉi tio – bedaŭrinde – la eklezioj ne povas helpi/kontribui. Nek en la teologiaj klarigoj eĉ malpli en ekzemplodonado en la praktiko.

Denove mi diras, mi ne kulpigas la antaŭulojn, la ”mondo” tutplene restadis en la eklezio sed tion eĉ la reformatoroj ne rimarkis; mi malĝojadas pri tio ke eĉ en nia generacio oni povis enkarceriĝi – kun eklezia kunlaboro – ĉar iu kun laŭvorta konsekvecemo protestis kontraŭ perforto.

## 2 La teologio de l'sango

Laŭ mia kredo oni devas radikale trapensi la signifon de la ”sangofero” kiun Jesuo suferis sur la kruco. Antaŭ ĉiam pli multaj kredantaj homoj komencas iom vidiĝi/klariĝi ke la malnova spekulativa, skolastika dogmatiko ne estas eltenebla, nome ĉi tiu instruo: Depost la pekuliĝo ĉiu homo damaĝas la gloron de Dio. La peko-afero devas esti aranĝita. Sed tion la homo ne kapablas. Tiom granda maljustaĵo trafis la gloron de Dio ke tiun homo ne povas korekti. Por tio necesas ofero, sangofero. Tio devas esti la sangofero de la Filo de Dio: la elverŝita sango de Jesuo sur la

**M**iguel SERVET, ankaŭ Michael Servetus, (naskiĝis la 29-an de septembro 1511, mortis la 27-an de oktobro 1553) estis hispana-aragona teologo, kuracisto, kartografo kaj humanisto.

Li estis la unua eŭropano, kiu bone priskribis la funkciadon de pulmoj. Li interesiĝis pri tre variaj fakoj, interalie astronomio, meteorologio, geografio, jurisprudenco, matematiko kaj anatomio. Li ludis gravan rolon en la historio de pluraj el tiuj fakoj, precipe de teologio kaj medicino.

Servet partoprenis en la Protestanta Reformacio, kaj sekve disvolvis aŭdacan, kontraŭ-triunuecan doktrinon, tiel ke li estis samtempe kondamnita de katolikoj kaj protestantoj. Li estis arestita en Ĝenevo kaj bruligita kiel herezulo, pro instigo de la reformisto Jean Calvin. [Vikipedio]

kruco repacigas Dion kiu abomenas la pekon, silentigas la justecon postulantan koleron de Dio.

Se nur iom ni povas liberiĝi de la malnovaj – sed tre profunde instinktigitaj – pensoj, tuj evidentiĝas ke tiu ĉi instruo montras tipe juristecan pensmanieron. Peko, puno, juĝejo, procedo, juĝo (kondamno) pripago, justeco. Tiu ĉi rigida, jurista pensado estas tute fremda de la pensmaniero de Jesuo. Laŭ li Dio ne estas Juĝisto, eĉ ne en sia personeco ofendita Juĝisto, sed Patro, Bona Patro, ”Kara Patro”. Ne Dio estas repacigenda al nia direkto sed laŭ la ege aŭdaca esprimo de apostolo Paŭlo – “*ni devas repaciĝi al Dio*” (2 Kor 5,20). La ĉion sendube decida teologia konfeso de Jesuo eksonas en la historio de la perdita filo. En ĉi tiu eĉ unu vorto ne estas pri repacigo, reparacio, repago. La tuta historio brilas en la lumo de la graco.

Kion signifas tiam la krucmorto de Jesuo? Savanta evangelio (bona mesaĝo) estas en ĉi tiu morto. Pro sia savivola amo Dio tiom transdonis sin al la homoj ”Vi ne povas fari tian malbonon kiu ŝanceligus mian amon. Mia amo ne dependas de via boneco kaj vian malbonecon mi ne tuj recipokas per eterna damno”. Jesuo amis tiujn kiuj minacis sian vivon. Li preĝis por ili. ”*Ili*

*ne scias kion ili faras.*” Dekomence Jesuo sciis ke la vojo de sia obeemo kondukos al la morto. Ankaŭ tion li sciis ke tio pruvos la evengelion, la patrecan amon de Dio al la pekuloj, ke per la rezigno pri sia vivo li sigelas ĉi tiun nekredoblan ĝojmesaĝon.

Ne eblas mallonge denombri ĉiujn bonaĵojn de la krucmorto de Jesuo. La esenco estas ke nur tion ne signifas ke lia morto turnis al amo la koleran Dion.

3 La teologio de apostolo Paŭlo kontraŭ la ”teologio” de Jesuo

La protestanta teologio pli multe konstruiĝas sur bazoj laŭ Paŭlo ol sur la vortoj de Jesuo. Ĉi tiu estas aŭdaca aserto, sed longe povus kaj devus esti pruvebla. El longa studado de la Biblio evidentiĝas ke Paŭlo elportis la formiĝantan unuan kristanan komunumon el la ”judeco” sed intertempe li ne pensis pri tio, kiom da ”judismo” li enmetis el si mem en la kristanisman. Ĉion el tiuj du asertoj eblas pruvi per fundaj ekzemplaj esploroj. Unuflanke se Paŭlo ”ne intervenas” certe per la gvidado de la ”kolonapostoloj” de Jerusalemo (Petro kaj la frato de la Sinjoro, Jakobo) la prakomunumo estus judiĝinta (fideleca al la jerusalema templa kulto, cirkumcido, koŝeraj manĝaĵoj). Aliflanke kon-

**T**homas MÜNTZER naskiĝinta ĉ. 1489 en Stolberg, mortinta la 27-an de majo 1525 en Mühlhausen, estis germana teologo, reformanto kaj revoluciulo. Müntzer ege simpatiis kun anoj de la movado Profetojn de Zwickau, kiu firme kredis je justigo de la socio en baldaŭa estonteco

Pro kvereloj li devis fuĝi al Mühlhausen kaj poste al Nürnberg. En 1525 li revenis al Mühlhausen kaj subtenis la kamparanajn ribelojn, formante taĉmenton rapidan. Pro la unuiĝo de pluraj princoj (protestantaj kaj katolikaj) la ribelo de ĉ. 8.000 kamparanoj estis frakasita. Müntzer, kiu gvidis unu trupon, estis arestita, turmentita kaj ekzekutita publike. [ĉerpoj el Vikipedio]

traŭ la pozitiva antropologio de Jesuo ("vi scias fari bonon" Mat 7,11) laŭ Paŭlo la tuta protestanta teologio baziĝas sur tio, ke vi scipovas fari nenion bonan.

Similajn gravajn postsekvojn havis tiu konata teologia tezo ke en la krucmorto de Jesuo aperis la vera signifo kaj pleneco de la malnovtestamenta granda, pentofara oferbuĉo. Jam estis citita ankaŭ alia penso de la apostolo pri la "repaciĝo". Serioze li pensis tion, sed ankaŭ ĉi tiun. "*kiun Dio antaŭdifinis kiel repacigilon ...*" (Rom 3,25). Sur ĉi tiun Vorton konstruiĝas la tuta protestanta savdogmaro. La simplan savteorion de Jesuo Paŭlo implikis en la judan "propago" teorion, teologion.

En la supraj tri tezoj mi prezentis tion "pli bonan" kion pluenirante sur la spuroj de la reformatoroj ni devas funde trapensi kaj prilabori. Sed mi devas ion gravan aldoni ankoraŭ pri la "vicigo" de la Vortoj. Ekzistas tiuj ideoj kiujn oni povas subteni per multaj Vortoj, aliajn nur per malmultaj. Mi estas forte konvinkita ke ne la multeco de la Vortoj pruvas iun teologian tezon, sed tio estas decida en kiu rilato estas tiu tezo kun la Spirito de Jesuo Kristo. Ekzemple: la sangavida, kolera, juĝon stariganta Dio malfacile estas akordigebla kun la Abba-Dio de Jesuo, kvankam pli multaj Vortoj estas vicigeblaj por la "pruvo" de la punanta Dio ol por la bona/ĝoja mesaĝo de la Patro de Jesuo.

☞

Antaŭ 70 jaroj finiĝis la dua mondmilito

## La repaciĝa preĝo de Coventry

*Ĉiuj estas pekintaj kaj mankas al ili gloro, kiun ili devus havi ĉe dio.*

(Rom 3, 23)

La malamon, kiu dividas rason de raso,  
popolon de popolo, klason de klaso  
PATRO PARDONU

La akaparajn dezirojn de homoj kaj nacioj  
por posedi, kio al ili ne apartenas  
PATRO PARDONU

La avidon, kiu ekspluatas la laboron de  
la homoj kaj dezertigas la teron  
PATRO PARDONU

Nian envion pri la bonfarto kaj feliĉo de  
aliaj  
PATRO PARDONU

Nian indiferenton pri la mizero de  
kaptitoj, senhejmuloj kaj rifuĝintoj  
PATRO PARDONU

La volupt-amon, kiu pereigas la korpojn  
de viroj, virinoj kaj infanoj  
PATRO PARDONU

La orgojlon, kiu nin misgvidas fidi nin  
mem pli ol Dion  
PATRO PARDONU

*Estu bonfaraj unu al alia, bonkoraj,  
pardonantaj unu al alia, kiel ankaŭ  
Dio en Kristo pardonis al vi.*  
(Efe 4,32)

# Kreskantaj eklezioj en Tanzanio

Pastoro Leif NORDENSTORM, SE

Multaj eklezioj en Eŭropo stagnas, dum eklezioj en Afriko kreskas. Ekzemplo pri tio estas Sveda eklezio, kiu havas 6,3 milionojn da membroj dum la Evangelia-Luterana Eklezio de Tanzanio havas 6,2 milionojn. Baldaŭ la Sveda Eklezio cedos sian lokon kiel la plej granda luterana eklezio en la mondo al la Tanzania ekvivalento aŭ eble al la Etiopia Mekane Yesus-eklezio.

Mi ekde 2011 laboras pri pluedukado de pastroj de la Sveda Eklezio kaj pri “profundigita edukado” de estontaj pastroj ĉe la Fondaĵo *Fjellstedtska skolan* en Upsalo. Por iom pli lerni pri la kreskado de la Tanzania kristanismo ni aranĝis universitatan kurson kun studvojaĝo. Partoprenis 19 studentoj kaj pastroj, kiuj studis la historion de la Tanzania Eklezio kaj faris studvojaĝon 19 februaro – 3 marto 2015. Multon oni povus rakonti pri la vojaĝo. Mi tamen nur mencias kelkajn aferojn, kiuj povas klarigi kial la eklezio kreskas.

Unue ni devas mencii ke Svedio dum preskaŭ mil jaroj almenaŭ oficiale estis preskaŭ centprocente kristana. En tia lando eklezio ne povas kreski laŭprocente. Tanzanio dum longa tempo estis tradicireligia. La plej malnova moskeo en Zanzibaro konstruiĝis en 1007. Kristana misio alvenis abunde nur en la 19a jarcento. Multaj kristanaj eklezioj sukcesis krei bonan lokan formon de

kristanismo en kiu oni ne kopias la Eŭropan formon de kristanismo, sed konservas gravajn trajtojn de la tradiciaj afrikaj religioj, ekzemple la fortan rolon de la prapatroj. Alia afrika heredaĵo estas la dancado. Unue kristanaj misiistoj kontraŭis ĝin. Poste ĝi povis okazi ekster la preĝejo post la diservo. Nun dancado en multaj preĝejoj okazas en la diservoj mem. Katolikaj, luteranaj kaj anglikanaj eklezioj same bone sukcesis trovi lokan formon de kristanismo. En la regiono ĉirkaŭ Iringa tamen ekzistas ankaŭ 12 grek-ortodoksaj preĝejoj. Ili estis konstruitaj dum periodo kiam enmigris grekoj por kultivi tabakon. Nun tamen restas nur ses grekaj familioj en la regiono kaj multaj grek-ortodoksaj preĝejoj ŝajnas esti malaktivaj, eble ĉar la ortodoksa eklezio ne same facile absorbis afrikajn tradiciojn kaj pensmanierojn.

Alia kialo de la kreskanta luterana eklezio estis ke ne nur pastroj sed mult-



Infanoj ĉe eklezia infanejo en Iringa.

egaj laikoj fervore propagandas kristanismanon. En la luterana eklezio oni formis trijaran programon por eduki laikojn. Dum ĉiu jaro oni legas tri librojn kaj kolektiĝas por diskuti la enhavon de la libroj. La celo de la edukado estas plifortigo de la engaĝiĝo de laikoj, sed kelkaj el ili komencas studi teologion kaj poste pastrigas.

La Tanzania Luterana Eklezio ankaŭ komprenis la gravecon pritrakti ĉiutagajn problemojn de la kristanoj. Nia grupo vizitis la diocezan oficejon en Iringa, kie la pastrino Joyce Mbandango rakontis pri la virina- kaj familia agado en la diocezo. En la paroĥoj oni ĉiunmerkrede organizas kunvenojn en kiuj oni traktas praktikajn aferojn: familian ekonomion, rilatojn inter edzo kaj edzino, edukadon de infanoj kaj la internaciigon. La laste menciita temo traktas novajn ideojn, kiujn la paroĥanoj renkontas en televido kaj interreto. Multaj gejunuloj tuj akceptas la idealojn, kiujn ili renkontas en usonaj televidaj serioj. Tial oni devas diskuti ĉu tio vere estas bona aŭ ne. Dekomence oni nomis tiujn ĉi kunvenojn “virina agado”, sed montriĝis ke en kelkaj lokoj


ankaŭ viroj volas partopreni. Tial oni pli ofte uzas la nomon “familia agado”.

Alia kialo de la kresko de kristanismo en Tanzanio estas la antaŭe fortaj ligoj inter kristanismo kaj lernejoj. Kvankam la lernejoj nuntempe estas ŝtataj, la antaŭaj ligoj kreis edukadon inter kristanoj. Islamanoj ne en la sama maniero havas edukadon tradicion. Pro tio ĉi homoj estas allogitaj al kristanismo.

La masaja popolo ankoraŭ ĝis antaŭ dudek jaroj preskaŭ entute estis tradici-religia. Tamen ĉefe virinaj masajoj pli kaj pli ofte fariĝas kristanoj. Ili ofte indikas la kialon ke kristanismo havas bonan moralon kaj ke ili esperas ke ankaŭ iliaj edzoj kristaniĝos kaj pro tio ĉesos drinki.

Ni ankaŭ menciis la rilaton inter kristanismo kaj islamo en Tanzanio. Tradicie ĝi estas bona. Kristanoj kaj islamanoj kutime ekzemple partoprenas la entombigojn unu de la aliaj. Dum la lastaj dek jaroj en kelkaj lokoj la rilatoj malboniĝis. Saŭdi-Arabio invitis junajn islamanojn studi en Saŭdi-Arabio. Ili revenas al Tanzanio kun la opinio ke oni devas propagandi “puran” islamon, tio estas ŭahabismo. En subĉielaj renkontiĝoj ili propagandas kontraŭ kristanismo. Okazis atakoj kontraŭ porkbuĉejoj kaj kristanoj raportas ke islamanoj rifuzas dungi ilin aŭ ludoni loĝejojn al ili se ili ne islamaniĝos. Kompare al la rilatoj en aliaj landoj tiuj en Tanzania tamen estas bonaj.

Tanzanio estas studinda ekzemplo de kreskanta kristanismo. La partoprenantoj de nia studvojaĝo revenis kun multaj novaj impresoj.



La anglikana eklezio en Iringa organizis restoracion, kie laboras nur surduloj. Bildo el menuo.





# Liberigo per la Nomo de Jesuo

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

Ĉu demonoj vere ekzistas? Jesuo Kristo kredis ke jes, kaj ni legas en la kvar Evangelioj ke Li multfoje forpelis demonojn kiam Li piediris sur la tero. La demonoj ankoraŭ ekzistas kaj estas viglaj en la mondo. La liberigo kaj la ŝirmado kontraŭ la demonoj ankoraŭ troviĝas sole ĉe Jesuo Kristo.

En ĉi tiu artikolo estas rakontitaj la travivaĵoj de la evangelisto Paŭlo Decker en la ŝtato Kalifornio, kaj mia propra en Porto Riko.

La liberigo de juna geedza paro Antaŭ pli ol 40 jaroj kiam mi estis misiisto en Porto Riko, servanto de Dio nomata Paŭlo Decker vizitis mian preĝejanaron tie. Paŭlo estis servinta kiel misiisto en okcidenta Afriko dum naŭ jaroj. Kiam Paŭlo vizitis nin, li loĝis en la ŝtato Kalifornio kie li servis kiel evangelisto, predikante en diversaj universitatoj. Paŭlo persone rakontis al mi la sekvan historion.

Iun nokton, pastro telefonis al Paŭlo kun tre stranga rakonto. Ano de la preĝejanaro de tiu pastro havis filon, kiun mi nomas "Jozefo". Jozefo servis kiel usona soldato en la Filipinoj. Li estis forlasinta la kristanan fidon de siaj gepatroj, kaj li geedziĝis kun virino tute sen religio. La nova geedza paro baldaŭ komencis havi problemojn inter si. Klopodante plibonigi sian situacion, la

geedza paro komencis aĉeti kaj legi pornografiajn revuojn. Sed iliaj problemoj plimalboniĝis. Tiam ili observis ke malbonega, nevidebla estaĵo moviĝas en la hejmo. Iun nokton, la agadoj de la estaĵo (demono) estis tiel fortegaj ke la juna viro kaj lia edzino fuĝis for el la hejmo.

Ili alvenis al la hejmo de la patro. Li ridis kaj diris al Jozefo: "Ne ekzistas demonoj, almenaŭ ne ĉi tie en Ameriko. Plue, vi estas kristano!" (La patro forgesis ke la filo estis forlasinta sian fidon). "Ni reiru," li diris, "kaj mi montros al vi ke ne estas demono en via hejmo." La patro kaj la juna paro reiris kaj eniris en la domon.

La patro rigardis ĉirkaŭen kaj diris: "Vidu, estas neniu ĉi tie."

La bofilino diris: "Rigardu tien, paĉjo, proksime de la ŝrankoj. Iu moviĝas tie."

La bopatro respondis: "Kie [krucante al la ŝrankoj], ne estas ne---." Je tiu momento la demono ekprenis lin kaj ĵetis lin trans la ĉambron!

Paĉjo tuj kaj unue forkuris el la domo, sekvata de la geedza paro. La patro iris al sia pastro, kaj tiu pastro bedaŭrinde ne sciis kion fari. Li telefonis al Paŭlo Decker pri la problemo.

Paŭlo diris: "Mi povas fari nenion. Mi estas meze de serio de paroladoj en universitato. Ĉu vi ne povas trovi alian personon?"

La patro respondis: “Ne. Kion vi faras nuntempe?” (Estis la dudek tria horo!)

Paŭlo respondis: “Bone, mi iros.”

La patro aranĝis kun Paŭlo ke la juna paro renkontu lin en parko proksime de sia hejmo. Ili nepre ne atendu lin en la domo. Nek la patro nek la pastro volis partopreni plu la aferon!

Post la renkonto kun la juna paro en la parko, Paŭlo reiris kun ili al la domo. La tri personoj sidiĝis sur la planko en la familia ĉambro. Paŭlo klarigis al ili ke ili devas ricevi Jesuon Kriston kiel sia Savanto. La junulo preĝis malsincere, sed lia edzino preĝis el la koro. Subite la demono falis sur la junan viron, kaj li ĵetis sin kontraŭ Paŭlon, ekkriante: “Helpu min! Helpu min!” (Paŭlo estis sub la ŝirmo de Kristo, kaj la demono nenion povis fari kontraŭ li. La juna virino antaŭ momentoj estis akceptita Kriston kiel sian Savanton kaj ankaŭ ŝi estis sub Lia ŝirmado.) Paŭlo kuraĝe forpelis la demonon per la nomo de Jesuo. Tiam Jozefo estis preta por preĝi sincere.

Tiam Paŭlo diris: “Nun ni devas (spirite) purigi la domon.” La junulo estis alportinta statuojn el la Filipinoj. La virino montris lignan statuon de kato: “Tiu statuo ĉagrenas min.” Paŭlo diris: “Portu ĝin al la ŝarĝaŭteton.” Tiam la virino montris alian lignan statuon de kato: “Tiu statuo pli multe ĉagrenas min. Mi ne aŭdacas rigardi ĝin.” Paŭlo: “Tiu ankaŭ al la ŝarĝaŭteton.”

La juna paro kondukis Paŭlon al la dormoĉambro. Tie sur la planko estis amaso da pornografiaj revuoj de la planko ĝis la nivelo de la lito! Paŭlo: “Ĉio tio al la ŝarĝaŭteton.” Tie en la dormoĉambro

estis ankaŭ statuo de preskaŭ nuda virino. La edzino de Jozefo diris: “Ŝajnas ke ŝi sekvas min per sia rideto.” Paŭlo: “Tiu ankaŭ al la ŝarĝaŭteton.”

Paŭlo rakontis al mi ke kiam ili finis “purigi” la domon, la ŝarĝaŭteto estis plenplena de tiu rubo. Li diris ke li ne povis riski ke la kolektantoj de rubo infektiĝu per tiuj pornografiaj revuoj kaj la alia rubo. Tial li bruligis tion per granda rubfajro en barelo malantaŭ sia domo la sekvan tagon. La lignaj statuoj de la katoj bruliĝis kun stranga flamo. Kelkajn semajnojn poste, Paŭlo ricevis leteron de la patro de Jozefo, per kiu li skribis ke la situacio inter la gejunuloj tre boniĝas kaj ke ili fidele ĉeestas la diservojn. (Kompreneble, ne ekzistas plu problemo pri demono en la hejmo.)

La liberigo de Ester Aquino

Je la jaro 1967, mia edzino Mildred kaj mi kun niaj gefiloj, Ester kaj William, ekiris al insulo Porto Riko kun la celo komenci preĝejanaron en la nova urbego Levittown. Mi pasigis multajn monatojn vizitante la loĝantojn en iliaj hejmoj. Dum miaj vizitoj, mi ekkonis virinon nomatan Ester Aquino. Ŝi havis pli/malpli 35 jarojn. Ester komencis ĉeesti la diservojn de la nova preĝejarnaro. Baldaŭ ŝi akceptis Jesuon Kriston kiel sian Savanton.

Sed Ester havis tre grandan problemon. Ŝia patro kaj ŝia vicpatrino estas mediumoj kiuj praktikas sorĉarton, kaj ofte celebras seancojn en sia hejmo.. La demonoj kiuj posedas la gepatrojn kaj loĝas en ilia hejmo tre koleras ĉar Ester klopodis eskapi for de ilia influo. Kelkfoje ili atakis ŝin. Ester estis malgranda

virino kiu pezis nur 45 kilogramojn. Sed kiam la demonoj atakis ŝin, ŝi laŭte kriegis kaj perforte svingis la brakojn kaj la piedojn. Minimume kvar aŭ kvin personoj povis regi ŝin.

Iun dimanĉon matene mi ĵus komen- cis prediki kiam la demonoj atakis Ester-on. Mi momente pensis fini la predikon, sed tiam mi komprenis ke precize tion la demonoj deziras. Do, mi daŭrigis prediki dum Mildred kaj kvar aŭ kvin aliaj personoj forportis Ester-on al la korto malantaŭ la preĝejo.

Mildred neniam bone parolis la his- panan lingvon kaj iujn tagojn antaŭe ŝi estis pensanta kiel ŝi povas riproĉi hispane la demonojn se ŝi renkontas ilin. Sed la Spirito de Dio montris al ŝi ke la demonoj ekzistas dum multaj jarcentoj kaj ili komprenas ĉiun lingvon. Mildred

rakontis al mi poste ke tie en la korto ŝi forte riproĉis angle la demonojn dum la aliaj gefratoj hispane riproĉis ilin per la nomo de Jesuo.

Fine Ester kvietiĝis kaj ŝajnis ke la demonoj forlasis ŝin. Tiam Mildred rimarkis ke Ester estis mordinta sian brakon alte kaj malantaŭe en lokoj kiujn persono normale ne povas atingi. Mildred ne deziris forlasi tiun aĉan makulon kiel atesto de la atako de la demonoj. Do, ŝi sendis fraton en la domon (nia hejmo estis sub la sama tegmento kun la preĝejo) por alporti ŝmirajon. Kiam Mildred aplikis la ŝmirajon al la makulo, kaŝita demono diris kun profunda voĉo per la buŝo de Ester: “Ne tuŝu tion!” Mildred ege koleris kaj forte riproĉis kaj forpelas ĝin. Jes, tiu demono komprenis la anglan lingvon! Denove, Ester kvietiĝis.

La demonoj lastfoje atakis Ester-on, la vesperon de Kristnaska tago. La gejunuloj de la preĝejanaro estis irantaj en “paranda”. (Dum decembro, grupoj de Porto Rikanoj nokte vizitas la hejmojn de siaj amikoj. Ili subite alvenas kaj laŭte kantas Kristnaskajn kantojn. La celo estas vekti la tutan najbararon! Poste, la loĝantoj de la domo invitas la grupanojn internen kaj donas al ili nutraĵon kaj trinkaĵon. Tiam la loĝantoj de la domo kuniĝas kun la aliaj grupanoj kaj akompanas ilin al alia domo. Tio estas iri en “paranda”.) Tiun nokton, la gejunuloj alvenis al nia hejmo je la unua horo de la mateno. Ili parkis siajn aŭtojn unu domblok distance de nia domo kun la celo silente alveni al ni.

Sed kiam Ester, kiu akompanis siajn du junajn filojn, eliris el la aŭto, la



G. Doré: Jesuo forpelas demonon el muta viro. Mat 9,32-34

demonoj forte atakis ŝin. Mi vekigis el profunda dormo aŭdante Ester-on laŭte kriegi. Kvin el ni, unu persono por ĉiu brako kaj kruro kaj mi subtenante ŝian kapon kaj kovrante ŝian buŝon per la manoj, metis ŝin sur sofona en nia domo. Ni nur utilis sufiĉan forton por subteni ŝin sur la sofo kaj por ke ŝi ne difektu sin. Tiam komenciĝis batalo kontraŭ la potenculoj de la mallumo kiu daŭris ekde la unua horo ĝis la kvina kaj duono de la mateno. Ni riproĉis kaj forpelis la demonojn per la nomo de Jesuo. Momente Ester kvietigis kaj denove ŝi kriegis kaj svingis la brakojn kaj la piedojn. La demonoj atakis kaj ni kontraŭatakis. Ni neniel misuzis ŝin.

Je la kvina kaj duono, Jesuo donis la venkon. Ester trankvile sidiĝis kaj preskaŭ nenion rememoris kio okazis dum la pasintaj horoj. Ŝi nur sentis sin tre, tre libera. Ĉar ŝi estis alveninta kun tioma skandalo, vekinte la tutan najbararon, ni eliris el la domo kaj tre laŭte kantis la konatan hispanan rekantaĵon: “No hay Dios Tan Grande

Como Tu” (Ne Ekzistas Dio Tiel Granda kiel Vi). Tial ni anoncis la venkon de Dio al la tuta najbararo. Tiam Ester diris al Mildred kaj al mi: “Hieraaŭ nokte mi preparis Kristnaskan manĝaĵon. Nun ni devas celebri mian liberiĝon. Venu kun mi por manĝi tiun manĝaĵon. (Ester estis tre bona kuiristino.) Kaj je tiu horo (la sesa horo matene) ni partoprenis tre bongustan manĝaĵon!

La demonoj ne atakis plu Ester-on. Dum multaj jaroj ŝi fidele ĉeestis la diservojn de nia preĝejnaro. Ŝi pasigis la lastajn jarojn de sia vivo en rifuĝejo de maljunuloj en la ŝtato Florido proksime al sia malpliaga filo kaj lia familio. (Tiu filo kaj lia familio estas bonaj kristanoj.) Antaaŭ kelkaj monatoj, Ester forpasis al la ĉeesto de sia tre amata Savanto.

Mi denove atestas ke ekzistas ŝirmado kaj liberigo kontraŭ la demonoj sole ĉe Jesuo Kristo. LI ESTAS LA VENKANTO. Li meritas ĉiun gloron!



## El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

### 7. aprilo

Ho Patro, la homoj en la bonfartaj landoj komprenu, ke ili devas doni el sia materia riĉeco kaj abunda superfluo al la malhavantoj kaj rifuĝantoj en la mondo, ne kiel almozo, sed kiel rajto de la aliaj. Mi mem donu la ekzemplon.

Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso en la kolofono). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.



# Hendrik De Hoog sepdekjara

Ed BORSBOOM, NL

Ĉi suban intervjuon Ed Borsboom faris en 1980 okaze de la 70-a naskiĝtago de De Hoog. La teksto parte aperis en tiu jaro en la gazeto LITERATURA FOIRO.

**A**ntaŭ 25 jaroj aperis gramatika studo “Du malsanoj en Esperanto”. Ĝia aŭtoro, la nederlandano H.A. de Hoog, per unu frapo internacie famiĝis, ĉar lia verko estis *brila ekzemplo de lingva esploro* (Waringhien), verkita en modela kaj metaforriĉa prozo.

Iom en la fono De Hoog konstante laboris por la Internacia Lingvo. Precipe en Nederlando, kie oni akre sentas nuntempe la mankon de generaloj en la armeo de esperantistoj, la akademiano okupas gravan lokon en la malgrandiĝanta lingva stabo.

Okaze de lia sepdeka naskiĝtago la redakcio gratulas lin kaj deziras al li ankoraŭ multajn energiplenajn horojn.

Tridek kilometrojn norde de Amsterdamo ĉe la piedo de la nordmaraj dunoj kuŝas surprize bela vilaĝo Castricum. Tien en komfortan domon retiriĝis Hendrik De Hoog kelkajn jarojn antaŭ sia emeritiĝo. La renkonto okazis en la familia ĉambro dum trinkado de kelkaj tasoj da teo, kiujn prizorgis sinjorino De Hoog.

Por la fakta interparolo De Hoog proponis sian studĉambron en la unua etaĝo. Pro la severa rigardo de la intervjuato, mi ĉekomence iom timis pri la

sukceso de la intervjuo, sed liaj okuloj dum li parolis ofte ekbrilis pro humurplena detalo. Ni baldaŭ intimiĝis kaj la disponita tempo de tri horoj rapide pasis, certe ankaŭ pro lia anekdotema rakontmaniero.

*Ĉu vi povas doni la enciklopediajn informojn?*

Mi naskiĝis la 24-an de marto 1910 en Scheveningen, la ĉemara kvartalo de Hago. Kvankam mi devenas el tradicie panbakista familio, la estro de la elementa lernejo konsilis daŭrigi la studadon, ĉar mi havis bonan lernkapon. Tiutempe la instruista seminario estis la plej alta stupo de studo por junuloj el la mezburĝa tavolo. Havante 18 jarojn mi jam fariĝis instruisto en mia hejmkvartalo. Por resti en tiu posteno, oni devis ege labori, ĉar ekster la lernejo atendis centoj da senlaboraj kolegoj, kiuj avidis anstataŭi la eble nekontentigan instruiston.

Dum la vesperoj mi plu studis. Akiris diplomojn pri angla, franca kaj germana lingvoj kaj eĉ pri matematiko. Li specialiĝis pli kaj pli en la angla kaj ekde 1945 instruis tiun lingvon en Amsterdamo en mezgrada lernejo, kies direktoro mi fariĝis kaj poste en supera teknika lernejo.

### *Ĉu kaj Esperanto?*

En 1936 mi tro laboris kaj krize malsaniĝis. Por malstreĉi min, mi lernis Esperanton. Konatiĝo kun tiu lingvo estis mejloŝtono en mia vivo.

### *Ĉu dua mejloŝtono estis la komenciĝo de la milito?*

Pli precize la 20-an de marto 1941. Tiam en Nederlando ekfunkciis nazia dekreto, per kiu Esperanto estis malpermesita. Venis al la lernejo nederlanda policisto, kiun mi hazarde konis. Tial li konfiskis hejme nur parton el miaj esperantaĵoj. Intertempe gardis alia policisto mian edzinon, por ke ŝi ne povu averti samideanojn.

La Esperanto-vivo en Hago tamen ne estingiĝis. La protestanta klubo regule kunvenis ĉe diversaj membroj, por eviti impreson de kontinueco. Ankaŭ la ĉefoj de la haga Movado vizitadis gesinjorojn Isbrucker. Tiam ekzemple Julia iniciatis la fondon de Universala Ligo.

Alia problemo estis la evakuado. La nazioj komencis senhomigi la marborddan regionon, por pli efike defendi la konkeritan teritorion kontraŭ atakoj el Anglio. Fine mi transloĝiĝis al Amsterdamo en 1942.

### *Ĉu vi pleje laboris en la protestanta Esperanto-movado?*

Jes, en 1937 mi fariĝis membro de KUNE, la nederlanda sekcio de KELI (Kristana Esperanto-Ligo Internacia) kaj post la milito ĝia prezidanto.

Laŭ instigo de Erik Carlén mi donis en 1947 Esperanto-kurson por pastroj en Tostarp kaj faris propagandan voja-

ĝon tra Svedio. Tio instigis al la unua memstara protestanta kongreso en 1948. Samjare mi fariĝis estrarano de KELI kaj estis prezidanto de 1955-1961. Ĉion pri tiu organizaĵo vi povas legi en mia libro "Nia Historio" (Keli 1964). Cetere mi volonte verkadas. En la "Kristana gazeto" de KUNE kaj "Dia Regno" de KELI mi regule kontribuis precipe per prilingvaj artikoloj.

### *Ĉu ili estis via specialaĵo?*

Verŝajne, ĉar kelkaj el miaj studoj libroforme aperis. "Du malsanoj en Esperanto" (Hällabrottet 1954) eĉ relative populariĝis. Ĝis nun oni vendis preskaŭ 5000 ekzemplerojn. Aliaj kolektoj estas "La senpera verbigo de adjektivoj" (Den Haag 1955) kaj pri ata-ita en la esearo "La Zamenhofa Esperanto" (La Laguna 1961).

### *Ĉu tiuj gramatikaj esploroj estas temporabaj?*

Por paroli pri temporabo, mi devas mencii la kompiladon de la evangelia himnaro "Adoru kantante" (Ede 1971).



Malgranda komisiono, i.a. kun Burkhardt kaj Downes, preparis ĝin. Ni devis korespondi pri ĉiuj detaloj. Pro tio, ke mi estis unu el la motoroj, la publikigo post naŭjara penado vere senŝarĝigis min.

*Ĉu vi ankaŭ aktivis por la Esperanto-ekzamenoj?*

Inter 1949 – 1956 prezidanto de la ekzamena komitato. En la 60-aj jaroj la ministerio enkondukis regnan diplomon por Esperanto-instruistoj. Por ĝi mi kunmetis la studkompendion. La en ĝi lasta frazo, klariganta adjektan predikativon, tekstis ”Ŝi dancis nuda.” La instru-inspektoro tiam ankoraŭ – estis en 1965 – indigniĝis kaj proponis ŝanĝon. Mi emfazis la neceson de la ekzemplo. Ĝi restis. Mi gvidis la regnan komitaton 1965-1975. Post la pensiigo mi paŝo post paŝo malpliigas la esperantajn taskojn.

*Ĉu sed en la Akademio vi ankoraŭ laboras?*

Kiel estro de la gramatika sekcio oni



havas sufiĉe da laboro. Estas personoj, kiel Szerdahelyi, kiuj atakas la Akademion, kvazaŭ ĝi nenion farus. Sed rigardu la mapon kun korespondataĵoj nur de la lastaj jaroj. Ekzistas gramatikaj demandoj, kiuj ne dum unu-du tagoj estas formulitaj. Antaŭ kelkaj jaroj la Akademio precizigis ekzemple la uzadon de “sia”, eĉ se la nova regulo ne tute kontentigas min. Venas ofte ankaŭ petoj de esperantistoj por klarigi iun lingvoproblemon.

La Akademio restas iom en la ombro, sed ne forgesu, ke ĝi ne posedas proprajn enspezojn. Ni povus publikigi, se ni havus monrimedojn. Kial oni ne sendas al la pli gravaj anoj senpage la esperantajn periodaĵojn? Fakte estas ankaŭ, ke la granda parto de la membroj normale oficas kaj povas plenumi nur akademian taskojn en liberaj vesperoj.

*Vi jardekojn laboris por Esperanto: ĉu sencohava?*

Jes sendube. Ĝi ŝanĝis mian vivon. Devenante el strikta protestanta medio, mi lernis, ke ekzistas aliaj kristanoj kaj eĉ nekristanoj trans la landlimoj. Esperanto larĝigas la rigardon kaj kulturajn toleremon. Por kristanoj ĝi estas vere necesa, ĉar ĝi puŝas al ekumena pensado.

Nun envenas sinjorino De Hoog kaj anoncas la malvarmiĝon de la tagmanĝo. Kiel finceremonion mi proponas fotadon en la ĝardeno, kie la fototoj daŭre kaj streĉe ordigas la harojn, distordataj de la marvento.



Bildo el Nia Historio. Maldekstre Henry Lundin, dekstre H.A. De Hoog

# Vesperaj pensoj

dum la ekumena kongreso en Trento,  
21-an de aŭgusto 2014

Éva FARKAS-TATÁR, HU

**T**ute personajn travivaĵojn mi transdonas al vi, pri kiuj mi ĝenerale nur en tre malgranda rondo kutimas paroli. Sed mi tiun instigon ricevis, ke eble mi lastan fojon renkontiĝas kun vi kaj se Dio donis al mi tian longan vivon kun tiom da travivaĵoj, mi ne rajtas ilin forporti. Do, kion mi pensas, ke povus esti utila ankaŭ por vi, mi deziras rakonti.

Hieraŭ mi parolis pri travivaĵoj dum la sieĝo de Budapeŝto – en la manplato de la Sinjoro. Post la tempoj de la milito, venis kompreneble aliaj malfacilaĵoj, postmilita mizero kaj zorgoj tamen venis io tiel valora kaj interesa kion ni ne pensis antaŭe. Multon perdis la homoj, preskaŭ el ĉiu familio iu mankis, mortis aŭ estis kaptita kaj multon perdis la homoj ankaŭ materie. Pro la bombardado kaj pro la rabado oni multon perdis.

La homoj serĉis la trankvilon ie. Tia vekiĝo komenciĝis en nia lando, ke vere estis mirinde. Evangelizadoj ĉie en urboj kaj en provinco. En Budapeŝto tiom da homoj en la preĝejoj ke ili staris ankaŭ ekstere surstrate. Estis soifo por la mesaĝo de la Sinjoro kaj oni legis la Bibliion, oni kunvenis en bibliaj rondoj, grandaj konferencoj okazis multloke. Ankaŭ mia edzo ofte veturis al provinco ofte inter mizeraj cirkonstancoj kaj revenis hejmen kun ĝojo kaj danko pro

la benitaj evangelizadoj speciale inter la gejunuloj. Kompreneble la servantoj, la pastoroj kaj laikoj sciis unu pri la alia, ili helpis, sed kelkfoje ankaŭ kritikis unu la alian. Ili sciis, kiu kian stilon havas.

*Tiu ne estas sufiĉe serioza...*

*Li estas tre perforta...*

*En tia stilo paroli pri la Evangelio...*

Mi jam parolis pri tio, ke siatempe ni lernis multajn bibliajn Vortojn parkere, ni konis multajn bibliajn historiojn, do kolektiĝis larĝa klavaro, ke la Sinjoro povis eksonigi kion ajn, kiam estis aktuale. Mi memoras pri tio, ke iun pastoron mi ne multe ŝatis pro lia stranga, perforta stilo. Iun tagon mi laboris en la kuirejo kaj grumblis pensante pri iu novaĵo, kiun mi aŭdis pri lia kurioza parolo. Kaj kvazaŭ laŭte eksonis en mia kapo el la Biblio el la epistolo al la romianoj de la 13-a ĉapitro la 4-a verso: "*kiu estas vi, ke vi juĝas la servanton de aliulo, ĉu ne al sia sinjoro li falas aŭ staras?*"

Mi multe eksilentis kaj multe hontis pri tio antaŭ mia Sinjoro. Tio estis grava atentigo, ke ni multaj volas servi al la Sinjoro kaj ni estas tre diversaj homoj kaj ni ankaŭ restos tre diversaj. Ni havas diversajn stilojn, Sed rigardu tion en la Nova Testamento, kia estas stilo de apostolo Paŭlo kaj kia estas tiu de Johano.



Sed, se li estas servanto de la Sinjoro, la Sinjoro atentigos lin, se io ne plaĉas al Li. Ni devas esti dankemaj, ke la Evangelio estas predikata, ke troviĝas tiuj, kiuj fervore, entuziasme, sindone laboras, vizitas la malriĉulojn, malsanulojn kaj portas al ili la bonan mesaĝon – eĉ se ne laŭ nia stilo! Ne estas mia afero korekti tion.

Se ni plilarĝigas tiun rondon ni devas pensi pri tio, ke ankaŭ kiel eklezioj, denominacioj ni estas diversaj. Ni devas akcepti tion, ke ankaŭ la aliaj deziras sincere servi al nia kara Sinjoro. Eble mi absolute ne akceptus la servadon de tiu aŭ alia grupo. Sed povas esti ke kelkaj homoj ĝuste tiun stilon bezonas, mi ne estu malkontenta, se la Sinjoro akceptas tion. Mia edzo diris tion, se mi ne povas sincere ĝoji pri la sukceso de

aliuloj – tiam temis pri diversaj ekleziaj komunumoj – mi riskas la helpon de la Sankta Spirito. Ni eble povas diri tion, sed se ni enrigardas, ni povas konstati, ke fari tion estas malfacile. Multe pli facile estas kune plori kun la plorantoj ol kune ĝoji kun la ĝojantoj – ĉar tie aperas la envio. Ĝoji pri la sukceso de la alia, kiam mi ne havas tian sukceson estas malfacile,

La atentigo, kiun mi ricevis estas: "*Kiu vi estas, ke vi juĝas la servanton de aliulo. Li staras aŭ falas por sia sinjoro*". Mi pensas, ke la Sinjoro mem parolos kun ni pri tiu temo kaj li lumigos tiun angulon de nia koro, kien ni mem ne multe ŝatas enrigardi, sed la Sinjoro volas helpi al ni, ke en ĉiu anguleto estu lumo.

☩



## Vesproj

VESPERAJ LAŬDOJ – en KRISTANAJ FONTOJ

Informas Albrecht KRONENBERGER

**K**araj, la VESPERAJ LAŬDOJ (Vesproj) por ĉiuj dimanĉoj kaj solenoj de la liturgia jaro nun estas en KRISTANAJ FONTOJ:

<http://fontoj.net/> >Unua paĝo >dekstra kolumno: DIMANĈAJ VESPERAJ LAŬDOJ.

Preĝu sola aŭ en komuno, ekzemple per Skajpo.

KRISTANAJ FONTOJ

Unua paĝo || A - Z | Adoru | Biblio | Breviero | Meslibro | Traktatoj | Trezorejo | ☞ | 🇩🇪 | 🇬🇧 | 🇮🇹

Ĉu ... preĝi | mediti | ricevi instigojn || kanti | muziki || informiĝi | legi | studi || prepari Diservon

**P**lej volonte mi ĉirkaŭbrakumus kaj ŝultron frapetus oĉjon Januaro, ĉar li estis tiel ĉarma kaj alportis nur mildan malvarmon. Fojfoje ĝi eĉ sunbrilon donacis al ni. Male, tiun ĉi turpan, aĉan, maljunegan megeron, onjon Februaro, mi malkonfesus el la familio! Kvankam la kompatinda maljunulino nur sian laboron faras! Ŝi alportis neĝon kaj malvarmon. Bonŝance, “senanime”, ŝi ne pretendas esti amata! Cetere, ekzemplodone ŝi plenumas sian taskon, klopodante fari la neglektitan laboron anstataŭ oĉjo Januaro. Bone, ke foje ankaŭ ŝi eklaciĝas aŭ simple forgesas tiri la grizajn nubokurtenojn, kaj la suno rapide brila ridetas la mondon. Tiu ĉi eta instigo sufiĉas, ke mi tuj pensu pri karega Marteto, kaj ke mi rememoru la neŝanĝeblan fakton: alproksimiĝas la printempo, la esperiga verda mondo.

En mia infanaĝo pleje mi ŝatis la vintron. La neĝblankecon! Nun mi jam scias, ke mi ŝatis la senzorgan feliĉecon! Kiam mi ankoraŭ ne konis la ideon de la respondeco! Kiam la plej grava tasko estis la ludo. Dio mia! Kiel bone estis vivi, kiel infano! Atendi la anĝelon! Vivi en familia amo! Nenion scii pri la multaj malbonoj, kiuj ekzistas en la mondo! Nun mi nur danki povas tiun tre malnovan feliĉon, kiu iĝis sekurecon donanta fundamento de mia vivo-domo, ĉar tiel povis konstruiĝi ĉi-domo sur

rokŝtono kaj tiel ĝi iĝis neŝancelebla.

Pasas la tagoj kaj la semajnoj kun vintreca monotoneco. Jam pasis unu monato de ĉi-jaro. Iom post iom, vole-nevole, finlernas la homo, aŭ nur senpove akceptas, ke estas neperceptebla: fakte kion signifas la tempo, tio estas ties forpaso. Ke ĉio estas nun: pasinteco, nuntempo kaj futuro. Se akceptas se ne, la homo vivas sian sorton: ekde la senzorga infanaĝo ĝis la zorgoplena maljunaĝo. Ĉe la komenco *ankoraŭ* oni ne scias kia estas la mondo, ĉe la fino *jam* oni scias, sed forton ne plu havas ŝanĝi ion ajn.

De la feliĉa sencio alveni al la malfeliĉa konscienco: estas sufiĉe amara afero. Kion oni devintus, kion oni povintus fari aliel, ĉu? Aŭ kion oni ne devintus kulpi, ĉu? Certe-certe, estus pli bone vivi sen konscienciproĉo.

Kaj bone kaj malbone estas, ke ankaŭ la memorkapablo jam ne funkcias kiel antaŭe. Kompreneble estus pli bone, se ni forgesus nur la malbonajn aferojn, sed ankaŭ tio, kiel multaj aliaj kunligitaĵoj de la vivo, ne dependas de la volo. Kio estas neforgesebla, estu bona aŭ malbona memoraĵo, eterne reaperas en nia memoro.

Grandan prezon havas ankaŭ tio, se ni volas ion novan eklerni! Io malnova elegante malaperas el la menso kaj transdonas sian lokon al la nova, kio forte batalas por sia vivraĵo.

Ekzemple, nun (85 jaraĝe) mi ek-lernis la sanskritan lingvon. (Bonvolu ne ridaĉi!) Oni ne devas ektimi. Pro-vizore mi lernas nur sep vortojn. Nome la nomojn de la sep ĉakroj. Estas nekompreneble, kial estas tiel malfacile enmarteili ilin en la kranion. Pli bone dirante, estas tute komprenebla la mal-akcepto de iu nova scio. Sed mi ne lasas, ke la malemo venku! Kun ĉiutaga ler-nado kaj ripetado, malgraŭ ĉio, mi alproprigos ilin! Kiucele mi bezonas ĉi tiujn vortojn? Bona demando. Sed anstataŭ respondo mi rakontas, kiel mi konvinkigis denove, ke hazardo ne ekzistas. Kvankam ne ĉiam estas kompreneble kial io ĝuste nun aperas en mia vivo, ĉe ĝia krepusko, sed se ĝi alvenis kaj estas tie ĉi, mi diras: Bonan alvenon!

La ĉakroj

Iu sendis al mi la originalajn sanskritajn nomojn de la ĉakroj. Al ĉiuj ĉakroj estas al-kroĉita iu “deklaro”. La propono estas: ĉiutage ripeti ĉi-frazojn, ke la ĉakroj harmonie funkcii.

Pardonu! Eble ne ĉiuj scias, ke la signifo de la vorto “ĉakro” estas “rado” kaj ili montras la sep ĉefajn energi-centrojn de la homa korpo.

Se iun interesas, jen la sep sanskritaj nomoj:

- Muladhara
- Svadhista

‘यत् ांशुरो ज्मत्स्यं प्रेरुत्तरा,  
यत्तुं जेदुत्तरात् वत्तुं द्दुत्तरात् वत्तुं  
वत्तुं वत्तुं वत्तुं वत्तुं वत्तुं वत्तुं  
वत्तुं वत्तुं वत्तुं वत्तुं वत्तुं वत्तुं  
वत्तुं वत्तुं वत्तुं वत्तुं वत्तुं वत्तुं

La versiklo Joh 3,16 el sanskrita Biblio de 1863

- Manipura
- Anahata
- Vishudda
- Ajna (aĝna)
- Sahasrara

Fakte, mi eklernis ĉi tiujn – por mi malfacilegajn – vortojn, pro la pli kaj pli febla, senĉese malfortiĝanta memor-kapablo.

Foje demandis min iu amikino – konstatante, ke ĉio interesas min – “ĉu la unitaria religio permesas, ke vi okup-iĝu pri ĉiuspecaj aferoj?”

Mi trankviligis ŝin, ke mia religio havas nur du ordonojn:

- *Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj per via tuta forto.*
- *Amu vian proksimulon kiel vin mem.*

Mi ĉiam klopodas obei al ĉi tiuj du ordonoj.

“Facile por vi!” – konstatis iomete envieme mia amikino, kiu ne kapablis liberiĝi de la dogmoj.



**Sanskrito** estas eble la plej antikva hindeŭropa lingvo ankoraŭ aktive uzata; ĝi apartenas al la hindeŭropa lingvofamilio. Iam oni kredis Sanskriton la plej praa el ĉiuj hindeŭropaj lingvoj, sed poste oni trovis ke la hitita, ankaŭ hindeŭropa, estas eĉ pli aĝa. Sanskrito, kiu signifas "pura" aŭ "gramatike korekta" lingvo, estas sankta lingvo de pli da 1 miliardo da homoj (precipe hinduoj kaj mahajanaj budhistoj). Oni taksis, ke hodiaŭ ĝis du milionoj da homoj ĝin parolas kiel duan lingvon, kaj nuntempe oni skribas novan sanskritan literaturon. [ĉerpo el Vikipedio]

# Ekumenaj Bibliaj Tagoj

kun kantaro Adoru en Vroclavo

Oldřich Arnošt FISCHER, Ĉeĥio

**A**ntikva kaj glora pola urbo Vroclavo, estis loko, kie okazis ekumenaj Bibliaj Tagoj kun kantaro Adoru inter la 15-a ĝis 19-a de aprilo 2015. Domo nomata Notre Dame en strato de Sankta Marteno apartenas al Kongregacio de Fratulinj de Notre Dame. Programo por 46 partoprenantoj el ok eŭropaj landoj (AT, CZ, DE, IT, NL, PL, RO, SK) estis bonege preparita danke al Teresa Pomorska, muzikisto Stefan Lepping kaj aliaj perantoj.

Merkrede vespere la partoprenantoj aŭskultis interesan rakonton de estrino de la Notre Dame kaj pastro Stanisław Pawlaczek pri fondado de la Domo, poste ili prezentis sin mem al la aliaj. La unua Esperanto-grupo en Vroclavo (tiamnome Breslau) estis fondita jam en la jaro 1905. En la jaroj 1907-1909 formiĝis kristanaj (evangelianaj kaj katolikaj) grupoj. En 1961 okazis en Vroclavo la 16-a Tutpollanda Esperanto-kongreso, kiun partoprenis 650 personoj.



Ĵaŭde, vendrede kaj sabate la tago komencis ekde rozaria preĝo je la 7-a horo kaj sankta meso en la kapelo. Komuna matena preĝo kaj matenaj laŭdoj malfermis novan tagon, kiu alportis al ĉiuj partoprenantoj novajn travivaĵojn en amika etoso.

Post matenmanĝo kaj komuna kantado komencis prelegoj pri Apokalipso. Lasta libro de Nova Testamento, la Apokalipso de Johano, vere ne estas facila legado. En la teksto estas multe da simboloj, preskaŭ ĉiu vorto povas enhavi sian kaŝitan sencon. Sed ambaŭ prelegintoj, pastro Wilibald Kunigk kaj pastoro Wolfram Rohloff, bravure gvidis nin trans ĉapitroj kaj versikloj. Jes, nuna mondo estas endanĝerita de militoj kaj katastrofoj – iu trafe rimarkigis, ke apokalipsaj ĉevalrajdistoj el Apokalipso de Albrecht Dürer daŭre havas freŝe nigran koloron. La Sankta Biblio donas al ni esperon kaj montras al ni savon.

Tagmanĝoj kaj ĉiuj manĝaĵoj prezentis sanigan polan kuirarton – poloj vere scias bonguste kuiri! Posttagmeze kaj vespere ni povis ekkoni belegan urbon, kiu estas laŭ grandeco la kvara urbo en Pollando. Vivas tie pli ol 630 mil da loĝantoj. La urbo situas ĉe la bordo de la rivero Odro, havas 12 insulojn kaj 112 pontojn. Malnova urbodomo estis konstruita en la jaro 1534. Universitata urbo Vroclavo estas administracia, ekonomia kaj kultura centro de la Malsupra

Silezio. Ĝi havas 24 teatrojn, 16 muzeojn kaj 32 galeriojn. La dua mondmilito kaŭzis grandajn damaĝojn al tuta urbo. Nekredeble, ke belegaj lokoj, kie ni promenis, antaŭ 70 jaroj estis preskaŭ ruinoj. La urbfiero estas Katedralo de la Sankta Johano la Baptisto, kies du turojn oni vidas preskaŭ el ĉiu loko en Vroclavo.

Ĵaŭde ni trarigardis preĝejon de Sankta Maŭricio kaj vespere Miroslav Šváček prezentis videojn de Bibliaj Tagoj en Tuchoměřice kaj Ekumenaj Esperantistaj Kongresoj en Vroclavo kaj Trento-Cadine.

Vendrede ni vizitis sinagogon kaj liturgion pri muziko kun interesa prelego de pastro Aleksander Radecki, kiun esperantigis Stanisław Śmigielski. Gitaristo Patryk Filipowicz ĝojigis nin ne nur per sia belega muziko, sed ankaŭ per sia sincera emo eklerni bone Esperanton.

Sabate ni vizitis Katedralon de Sankta Johano Baptisto sur Katedra Insulo (Ostrów Tumski). Arkidieceza Muzeo, kiu estas la plej malnova muzeo en Vroclavo, gardas historian kontinuecon – ekde pli ol 100 jaroj ĝi kolektas antikvaĵojn de la preĝeja arto, kiuj –



retiritaj el la kulta utilo – enhavas daŭre grandegajn historiajn kaj altajn valorojn. Inter ili troviĝas la fama “Kroniko el Henryków” el la 13a – 14a jarcentoj, enhavanta la unuan frazon skribitan en pola lingvo. En Vroclavo estas ĝis nun sentebla spirito de papo Johano Paŭlo la 2-a, kiu kuraĝigis naciojn de orienta Eŭropo al batalo kontraŭ totalismaj reĝimoj. En la jaro 2009 en Alta Porpastra Seminario en Vroclavo okazis la



19-a Ekumena Esperanto-Kongreso.

Bedaŭrinde la tempo en Vroclavo pasis rapide kaj jam alvenis sabata adiaŭa vespero. Surprizo estis prezentado de loka muzika grupo, kiu bonege kantis pole kaj esperantlingve.

Dimanĉe ni partoprenis esperantlingvan sanktan meson en preĝejo de Sankta Marteno.

Apokalipso estas signifa temo, kiu meritas nian atentemon. Danke al oferema laboro de organizintoj de la Bibliaj Tagoj en Vroclavo 2015 ni iomete proksimiĝis al la Vero.

# Informoj

## Korespondpetoj

### Saluton kaj Dio benu vin

Mi nomiĝas Danielo kaj mi deziras kontakti kun vi. Mi legis la jarlibron 2014 kaj mi vidis vian nomon. Mi deziras kontakti kun kristanaj esperantistoj por paroli pri multaj aferoj. Mi estas 19 jaraĝa kaj mi estas la respondeculo de la Junulara Sekcio de Esperanto en mia provinco Granmo-Kubo, kvankam mi loĝas en Bajamo ĉefurbo de Granmo. Ankaŭ mi estas la prezidanto de la Junulara Sekcio en la Preĝejo: Pordo al la ĉielo, de la ministerio Betel.

Mi lernis Esperanton, ĉar mi pensas, ke la internacia lingvo estas grava por la paco, amikeco kaj interŝanĝoj inter novaj esperantistoj.

Se vi deziras kontakti kun mi, vi povas, ĉar volonte mi atentis vin.

Je la servo de Dio

Danielo

[esperanto@crisol.cult.cu](mailto:esperanto@crisol.cult.cu)

---

### Estimataj frato/inoj:

Mi nomiĝas Daimi Doval Delsa, loĝas en Urbo Havano, Kubo. Mi estas inĝenierino pri Agronomio kaj laboras en Instituto de Bestkuracado. Havas 40 jarojn. Mi esperantiĝis en la jaro 1993, aktiva membro de KEA (Kuba Esperanto Asocio). Partoprenis en multaj aranĝoj kaj en 95<sup>a</sup> UK okazinta en Havano-Kubo. En tiu ĉi kongreso mi kantis en la Kafokonsertejo, mi verkis kanzonon rilate al la kongreso.

Plaĉus al mi fari amikecon kun kristanoj evangelikaj gefratoj, por interŝanĝi ideojn, materialojn, kanzonoj-himnojn, ktp. Rilate al nia kreinto, Dio, kiu ĉiam estas en niaj vivoj por helpi, sani, protekti kaj doni eternan vivon al la homoj kiu akceptas kaj ricevas Lin kiel Sinjoro de Saveco.



Se vi deziras kontakti min sendu mesaĝon [anetvidal1987@gmail.com](mailto:anetvidal1987@gmail.com)

Sanon, pacon kaj prosperon kaj Dio benu vin!

Daimi Doval Delsa

# 21a Ekumena Kongreso

68-a de IKUE 65-a de KELI

1-8/08/2015, Strasburgo (FR)

## Daŭriga listo de aliĝintoj

- |                              |            |                             |          |
|------------------------------|------------|-----------------------------|----------|
| 30. Norbert Sudland,         | Germanio   | 42. Agneta Järnlström,      | Svedio   |
| 31. Bengt Olof Åradsson,     | Svedio     | 43. Felice Sorosina,        | Italio   |
| 32. André Åradsson,          | Svedio     | 44. Norma Cescotti-Covelli, | Italio   |
| 33. Ágnes Ráczkevy-Eötvös,   | Hungario   | 45. Francesca Tussardo,     | Italio   |
| 34. Gerda Dercks,            | Nederlando | 46. Bruno Masala,           | Francio  |
| 35. Tiziana Fossati,         | Italio     | 47. Guy-André Héroux,       | Francio  |
| 36. Daniel Chevalier,        | Francio    | 48. Michel Arlès,           | Francio  |
| 37. Marie-Thérèse Chevalier, | Francio    | 49. Gottfried Noske,        | Germanio |
| 38. Gerrit Berveling,        | Nederlando | 50. Bernard Meslin,         | Francio  |
| 39. Madzy Van der Kooij,     | Nederlando | 51. Zhang Fude,             | Ĉinio    |
| 40. Anna Landfors,           | Svedio     | 52. Anton Kiefer,           | Germanio |
| 41. Mats Landfors,           | Svedio     | 53. Samuel Gaillard,        | Francio  |



## Korekto - Aldono

**E**n la pasinta numero forfalas la ĝusta bildteksto en la nekrologo pri Wim Derks. Jen:

Maldekstre Ed Borsboom, meze Wim Derks, dekstre Josef Dorr la tiama prezidanto de Sarlanda E-o Ligo. La foto estas de 1989 en Nancy.



# Jesu', ni adoru / QUE TOUTE LA TERRE

1. Je - su', ni a - do - ru vin, Mon - do - re - gant'.  
Hom - fra - to, ni glo - ru vin, ĉi - es Ser - vant'.

Sin kli - nu ĉi - e - loj kaj ter' an - taŭ vi,

ho ĝoj' - de l' an - ĝe - loj, ho Fi - lo de Di'.

2. La tempo pleniĝis, ke venu mesi'.  
La Filo sendiĝis de l' alto de Di'.  
La Vort' enkarniĝis, rezignis pri glori'.  
Jesu', Vi naskiĝis en nokt-meza hor'.
3. Vin sbiroj eskortas al Monto Golgot'.  
Por ni Vi malfortas kaj kuŝas en kot'.  
La ŝarĝon Vi portas, premata vin-ber'.  
Surkruce Vi mortas por nia liber'.
4. Kun fort' en la pasko-dimanĉa tag-fru'  
el mort' kaj fiasko sin levas Jesu'.  
Ni ĉiam, Vivanto, Vin benos en ĥor',  
ĝis kiam, Savanto, Vi venos en glori'.

QUE TOUTE LA TERRE • Alléluia 41-21 • M (St. Denio): tradicia kimra, kun iom ornamita fina linio • kp. ADORU 475  
• franca T: RCPF 1999 laŭ Édouard Monod 1895 • © Fédération protestante de France, Paris, c/o Éditions Olivétan •  
E (preskaŭ originale verkita laŭ la strukturo de la franca T): 1a strofo: Albrecht Kronenberger 2015-03-29, 2a ĝis 4a  
strofo: Kloster Kirchberg 2015-03-31